

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Aprilo 2020

(52a jaro)

N-ro 183

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP



1923

15a Universala Kongreso de Esperanto
Nürnberg

Karaj Liganoj kaj Geamikoj!

Dum mi estas skribanta ĉi vortojn al Vi, ankoraŭ mi ne certas, ĉu eblas aŭ ne forsendi la LVL-on. Se daŭros ankoraŭ longe la rigoraj preskriboj ĝis - mi ne scias - kiam, probable ĝi atingos vin multe pli malfrue, ol antaŭvidite.

La ĉefaj problemoj estas du: ĉiuj kopiejoj estas fermitaj kaj - kio tre malpozitive influus sur la stato de nia kaso - estas absolute malpermesite transiri la limon inter Italujo kaj Slovenujo kaj do tio malebligas la sendon de la revuo el la poŝta oficejo en Sezana (dek ses km-ojn distance de Triesto). Se mi ekspedus ĉiujn LVL-ojn el Triesto, tio kostus la duoblon!

Tio estas bedaŭrindaĵo, tamen en ĉi momento ni estas plene konsciaj ke ĉi problemoj estas nenio kompare kun la pandemio. Ĉiu ajn estos komprenema, ĉar fine ni ĉiuj navigas sur la sama barko, kaj tion, kion italoj estas suferintaj/antaj, ankaŭ vi estas spertintaj aŭ spertantaj. Tial ni reciproke manpremu la manojn (virtuale!), brakumu unu la alian kaj kune atendu ke ĉesu finfine ĉi tutmonda plago, el kiu ni eliros pli fortaj, pli konsciaj pri la neestimebla valoro aparteni al la tuthomara komunumo, pli solidarecaj, ĵetante en la plej profundan puton ĉiaj malbonajn sentojn, malamojn, malhonestajojn... fariĝante mem pli respektaj al ĉiuj, sendistinge, ĉar ĉiuj ni estas nur "homoj kun homoj"!

Estime kaj elkore *Elda Doerfler*

PS: kortuŝita pro la pluraj retmesaĝoj ricevitaĵ fare de liganoj, zorgemaj pri mia sanstato, ankoraŭfoje mi ilin dankas pro la varmaj kaj kuraĝigaj vortoj!



Glumarko, eldonita okaze de la *160a Naskiĝdatreveno de Dr. L.L. Zamenhof*, de Esperanto Societo 2019 - 24400 SENTA (SRB) - Str. Glavna 15.

Sur blanka fono, centre la nigrokolore desegnita kapo de la Majstro, kiun ĉirkaŭas: TUTLANDA ZAMENHOFA FESTO; sube 15.XII.1859 - 14.IV.1917: ĉiuj skribaĵoj estas verdkoloraj. Ambaŭflanke la kvinpinta verda stelo, kun centre blanka majuskla E. Formato: 7 x 44 mm

Informis Imre Belec. Dankon al li!

ELF-AREK-RETEJO

ELF/AREK denove havas retejon.

<http://kolektado.esperanto.cc> estas la adreso, kiu kondukas al ĝi. Menuo donas aliron al pli ol 60 artikoloj en la diversaj fakoj de la retejo: filatelaĵoj, bildkartoj, glu-markoj, numismatiko, ekslibrisoj ktp. Dekstre de ĉiu hejmpaĝo de la retejo, oni trovas konstantajn ligilojn. Inter ili:

- * skatoleteto, per kiu oni povas tra-serĉi la tutan retejon por trovi la unuopan vorton aŭ esprimon;
- * listo de rete viziteblaj kolektoj de esperantaĵoj (informu al ni pliajn!);
- * faka terminaro pri filatelo de Herbert Scott;
- * honor-albumo, kiu omaĝas niajn forpasintajn samliganojn;
- * la kovrilo de la plej nova numero de *La Verda Lupeo*.

En la retejo, troviĝas la indekso de la lastaj 12 numeroj de *La Verda Lupeo* kaj iom post iom ni enretigos la antaŭajn. Tio estos tre utila rimedo por aliri la valoran enhavon de la pli ol 180 numeroj de nia bulteno.

Kiel vi povas kontribui?

- * Legu artikolojn kaj atentigu nin pri lingvaj aŭ informaj misoj;
- * verku artikolon pri eroj de via kolekto;
- * verku pri la historio de Esperanto surbaze de esperantaĵoj;
- * verku mallongan enkondukan tekston pri unu aŭ pliaj jenaj kolekt-aĵoj: Insignoj, Kongreskartoj, Telefonkartoj, Loteribilettoj, Vizitkartoj, Kalendaroj. Tiuj enkondukaj tekstoj donu mallongan panoramon aŭ historion pri la kategorio kaj ĝiaj rilatoj kun Esperanto.
- * diru al ni pri aliaj kategorioj de kolekto, kiun vi havas kaj ni kreos tion en la retejo.

Tekstoj pri viaj kolektaĵoj kontribuos al la enhavo de *La Verda Lupeo* kaj de nia retejo!



James REZENDE PITON, retejestro

EN VIRTUALA EKSPOZICIEJO - EXPONET

James REZENDE PITON

La tiel nomata Tut-Tera Teksaĵo (TTT), la parto de Interreto kun paĝoj kaj dosieroj libere alireblaj, jam de jardekoj montras sin utila rimedo por kolektantoj. Oni ne havas la senkomparan plezuron trarigardi senfinan aron da filatelaĵoj kaj poŝt-kartoj en skatoloj de pulbaraj komercistoj. Kompense, oni virtuale aliras ĉiujn “skatolojn” de plej etaj retbrokantejoj eĉ en Nov-Zelando. Plie, oni povas ricevi atenton pri nove alvenintaj kolektaĵoj, kiuj kongruas al niaj esplortemoj. La komputilo do eĉ serĉas por ni, 24 horojn tage.

Interreto ankaŭ ebligas al ni viziti kolektojn plej diversajn. Kiu povas ofte viziti grandan filatelan ekspozicion? Per hejmpaĝoj oni povas viziti la enhavon de kolektoj, ekkoni filatelaĵojn kaj la originalajn prezentojn de kolektantoj en la kunmeto de filatela materialo.

Pri unu el la plej elstaraj virtualaj ekspoziciejoj nin atentigas nia ĉeĥa klubamiko Vladislav Hasala, Strážnice. Temas pri lialanda EXPO-NET - <http://www.exponet.info> - kun mil kolektoj (el ĉ. 50 landoj) daŭre ekspoziciataj! La lingvoj de la retejo estas la ĉeĥa, la germana kaj la angla. Oni povas esplori la kolektron laŭ temoj, landoj, tempoperiodo kaj kategorio - jes, oni povas elekti kolektojn de i.a. pritema filatelo, poŝta historio kaj eĉ de bildkartoj.

Ĉiuj kolektoj montriĝas en “paneloj”. Per miniaturaj fotoj, oni povas havi panoramon de la foliaro, por la sama impresoj, kiun la kolekto kaŭzas en ekspozicioj. Sekve oni povas foliumi kaj grandigi, en taŭga maniero por priatenti detalojn. La kolektoj ĝenerale sekvas la FIP-regulojn por ekspozicioj, kvankam estas kelkaj malnovaj kolektoj, kiuj pro historia intereso konserviĝis kaj ne kongruas kun la aktualaj reguloj. Tio ne malhelpas, ĉar EXPONET estas vivanta enciklopedio de kolektado, kun realaj ekzemploj!

Ĉu Esperanto-kolektoj tie? Certe jes! Krom tiu de nia amiko Vlada Hasala (pri sovetaĵ tutaĵoj kun E-tekstoj 1925-39), tie troviĝas du kolektoj de la fama kaj karmemora Karel Bartošík.

Pliaj certe sekvas. Ĉu vi ne emas aldoni vian E-kolekton al ĝi? Nepre farinde kaj senpage! Vi povas trovi instrukciojn en la retejo, sed mi resumas ilin tie ĉi, por ke vi vidu, ke tio ne malfacilas:

a) Se eble, demetu ĉiun skanotan folion el sia plasta volvaĵo, por maksimuma kvalito.

b) Skan(ig)u ĉiun paĝon de via ekspozajo - evidente ankaŭ la unuan, eĉ se ĝi enhavas nur la indekson/planon - tio gravas! Uzu la konfigur-on por 16,7 milionoj da koloroj (t.e. 24 bitoj) kaj distingivo estu 300 dpi (punktoj por colo). La rezultanta bildo devas esti minimume 1280 punktojn (pikselojn) larĝa. La dosierformato povas esti la preferata JPEG (jpg) aŭ la pli “pezaj” TIFF (tif), GIF, Bitmap (bmp).

c) Al ĉiu skanita dosiero, donu nomon, kiu finiĝu per 001 ĝis 080 (kaj plu), laŭ la sinsekvo de la prezentado.

ĉ) Oni skribu al janik@exponet.info, kiu donos al vi uzulnomon kaj pasvorton por uzi la FTP-servilon en kiun vi pov-os deponi ĉiun dosieron kun skanaĵoj.

d) Alternative (kaj pli simple por tiuj, kiuj ne komprenas pri FTP): oni povas ĉiujn dosierojn kopii en KD/DVD kaj poŝte sendi al S-ro Milan Černík, P.K. 243, Praha 6, Ĉeĥio CZ-160 41.

Se vi havas teĥnikan dubon pri la ciferecigo de via kolekto aŭ bezonas helpon en la kontakto kun EXPONET (pro lingva baro, ekzemple), mi volonte provos helpi. Skribu al James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com




1887 (probable el 1913)

Marĝenoj, vortoj kaj steloj estas blankaj, escepte de la majuskle skribita ‘ESPERANTO’.

Ĉirkaŭe FRATEGA LIGILO** INTERNACIA ** UNIVERSALILLO. Interne sur striita fono verdblanca, HELPA LINGVO, kaj dufoje 1887.

Tute sube, du blankaj steloj, Pubblicité HERLEMONT Paris. Formato: 30 x 38 mm. La glm havas ondan randon.



Nekonata glm - kiu konas ĝin?

Grizeta estas la fono kaj ĉe ĉiu angulo nigra stelo; enkadrigita estas la frazo: *Lernu Esperanton, la internacian helplingvon*, en la lingvoj angla, germana, pola, hispana, nederlanda.

France kaj itale, legiĝas *Uzu Esperanton, tre facila helplingvo, en viaj internaciaj rilatoj*.

La lasta frazo kredeble estas en la rusa, dum la supran mi ne rekonas.

ĈU ANKAŬ TIAM ENTUZIASMIS

LA SIGNATUR—ĈASEMULOJ?

Elda DOERFLER

Certe iu(j) el vi sindemandas, kial sur la LVL-kovrilo aperas pk pri la 15a UK, okazinta en 1923 en Nurnbergo: ĉu pro speciala dato aŭ nostalgio pri tiu fora jaro kiu vidis la partoprenon de 4 963 (*precize tiel!*) esperantistoj? Mi kredas, ke nuntempe oni povas nur revii pri simila nombro da ĉeestantoj: ja mi forgesis, ke ni vivas en superteknologia kaj informadika mondo, kie ne plu necesas renkontiĝoj kvar-okule, kongresoj kie ‘homoj rilatas al homoj’, konferencoj kie brilaj oratoroj prelegas pri ĉia ajn temo en nia kara lingvo dum kiuj oni povas eĉ interveni. Nu, pardonu min, la ĉiaman nostalgion!

Jen klarigite: inter la diversaj temoj tre amataj de multnombraj kolektantoj, estas la freneze (jes, tiel ĉi!) serĉataj subskriboj de aktoroj, kantistoj, muzikistoj, pentristoj, ktp. Junaĝe mia pasia emo estis akiri kiel eble plej da subskriboj de miatempaj plej famaj filmroluloj. Pasis la jaroj, ŝanĝiĝis la “manio” kaj nun ek al febra elspurado de la *signaturoj* de eminentaj esperantistoj, prefere el la pionira periodo. Tial nun streĉu bone la okulojn kaj atente ekzameni la dorsan flankon de la LVL-surkovrila poŝtkarto. Certe iuj estas al vi konataj!



Jen la solvo - sur la reverso legeblas la dato: la 7^{an} de aŭgusto 1923, kaj la jenaj vortoj: *Ho ve. Kial vi ne ĉeestas: estas grandega sukceso*
via M. Moscheles.

Pli sube la subskriboj de Klara Zamenhof kaj de J M Warden, sed la du aliaj ne rekoneblas. Ĉu eble vi? Bedaŭrinde la poŝtmarko estis de la karto deprenita sed sufiĉe neta almenaŭ aperas la reklama horizontala stampo prikongresa.

Pri la subskribo de M(*argaret*) Moscheles: temas pri la vidvino de Felix Stone Moscheles, (1833-1917), angla pentristo, verkisto, pacisto kaj membro de la Lingva komitato ekde 1905. Lia patro Ignaz estis fama komponisto, kies amiko Felix Mendelssohn, la bone konata germana pianisto kaj muzikisto, estis la baptopatro de Felix Moscheles.

Plej kredeble, Klara Zamenhof estas tre bone konata de ĉiuj, tial nur aldonendas ke bedaŭrinde la Nurnberga UK estis ŝia antaŭlasta kongreso, ĉar post la Viena (1924) ŝi mortis komence de decembro pro hepata kancero.

Ĉi sube la reverso de alia pk-o (142 x 92 mm), sur kies fronto estis portreto de LLZ, kun la respondo de Sofio Zamenhof al kondolenca letero sendita de kuba amiko el Camagüey, iu s-ro Deniston (22/II.25).



Kaj nun pri la lasta, rekonebla subskribo, tiu de John Mabon Warden (Edinburgo, 1856-1933), kiu estis skota esperantisto, lerninta en 1905

nian lingvon, post kio tuj membriĝis en la Brita E-Asocio kaj vigle ekagadis. En la plej malfacila periodo inter 1916 kaj 1922 li estis ĝia prezidanto. John Warden kuntradukis la Sanktan Biblion kaj ĉefzorgis pri ties eldono, kaj ankaŭ verkis la Edinburgan vortaron. Li ĉiam fidele subtenis la Fundamentan lingvon kontraŭ ĉia atako kaj fuŝuzo.



En 1931 li iĝis Prezidanto de la Lingva komitato. Sed lia fervoro direktiĝis ankaŭ alidirekten: li estis egale eminenta en la aseka kaj stenografia kampoj. Granda kolektanto (*ankaŭ li!*) de libroj pri preskaŭ ĉiuj sistemoj de la stenografia arto, ĉ. 5000 li posedis: ĉiujn poste li donacis al la Skota Nacia biblioteko. Multon ankoraŭ pri li oni povus plidetaligi, sed pli bonas aŭskulti kelkajn konkludajn kaj tre elvokivajn vortojn de s-ro

William Harvey, kiu memorprelegis en la sidejo de la Esperanta Societo de Edinburgo - 15.3.1933.

S-ro Warden, kvankam modesta homo, ja estis grandulo en la Tutmonda Esperantistaro: eĉ multaj el ni, kiuj ĉeestas hodiaŭ, volonte kaj danke, konfesos, kiom ni ŝuldas pro lia helpemeco al ni kaj lia fervoro por la movado. Li estis unu el tiuj, kiuj 'faris la historion kaj definitive kontribuis al la progresado de la homaro.'

The British Esperantist - may 1933 - n. 337

Ĉu tiu ĉi rubriko tiklis viajn scivolemon kaj exploremon? Ĉu ankaŭ vi havas en via kolekto kartojn kun signaturoj de famaj esperantistoj, aŭ de esperantistoj el via lando, kiuj silente kaj modeste laboradis por nia afero, sed kies historioj estas interesaj kaj eĉ instruaj ankaŭ por aliaj? Mi invitas vin sendi viajn artikolojn al mi, prefere kun fotoj aŭ kartoj.

Koran dankon!



Spesmilo, Sm, mon-unuo en la internacia helpa monsistemo decimala, proponita de René de Saussure kaj uzita antaŭ la unua mondmilito, ĉefe de la Cekbanko Esperantista.



STAMPOJ KAJ IPM-OJ

En la decembra LVL, aperis informo pri stampo eldonita de la Bjelovara Esperantista Societo, okaze de ĝia 110a jariĝo. Antaŭ ĉ. unu monato mi ricevis koverton surhavantan tiun stampon kaj maldekstraflanke la fotojn de Vilim Polašek (1910-1994) kaj de memortabulo, pendigita sur la fasado de la domo, kie li estis loĝinta.

Li estis ĉef-devena, membro de tiu komunumo: li multon kontribuis al la evoluo ekonomia kaj kultura de Bjelovar. Esperantistiĝinta en



1922, li ekaktivis en 1932.

Multnombrajn kursojn li gvidis kaj plie realigis du kursojn ĉe radie.

De 1963 ĝis 1977 li okupiĝis, kun geknaba grupo pri la du-lingva, kroata/esperanta, ĵurnaleto, *Juna ambasadoro*.

Vilim Polašek verkis kaj publikigis libron pri la historio de Esperanto en Bjelovar, de 1909 ĝis 1969. Ĝis sia morto li aktivadis: feliĉe daŭrigas la saman vojon la filino Zdenka, ankoraŭ nun tre aktiva. La stampita koverto haveblas de esperanto.bjelovar@gmail.com aŭ de mi.

IPM-oj el Belgio

En la oktobra LVL, pĝ. 19a, estis montrita belga pm-o mendita de la belga E-grupo *Senlime*, decembre 2017. Post du jaroj, en la sama monato, estis eldonitaj aliaj 300 poŝtmarkoj individuaj (vd. la ĉi-flankan): nura diferenco estas, ke en tiu el 2017 supre kaj maldekstre estis skribite *Parlez...*, dum en 2019 *Parolu...* La pm-oj estis presitaj en Meche-



len, en la belga Poŝta Presejo (*Atelier du Timbre*). Ili validas nur por interna uzado.

La mezuroj estas 73 mm x 32 mm.

Mendo de pm-oj eblas pere de la kasisto de la E-grupo *SENLIME, rue Pierre Fluche 25 – 4800 Verviers, Belgio*.

Dek pm-oj kostas 12,00 € plus sendokoston: 1,20 € (en Belgio); 2,40 € al Eŭropo; 3,60 € ekster Eŭropo.

Pago pere de banko: IBAN BE41 9795 3271 4810; BIC ARSPBE22

Informis Raymond DEMARCHE, ELF-AREK-ano deziranta aĉeti E-poŝtmarkojn, prefere tiujn oficialajn.

Kiu povas lin helpi pliriĉigi sian kolekton? Jen lia adreso:

Raymond DEMARCHE
Rue Donckier 22
BE-4800 VERVIERS

En ĉi tagoj de *relativa* nenifarado, mi ordigis plurajn malnovajn paperkorespondaĵojn, dise lokitajn en plej diversaj ujoj kaj senditajn de pluraj amikoj. Kaj, kiel oni ofte faras en tiaj okazoj, oni kompreneble ekrelegas. Belajn kaj malĝojajn momentojn tiel ĉi mi pasigis, ĉar en la unua stokita pakajeto kuŝis la leteroj de nia karmemora Jean AMOUROUX. Ĉiujn mi tralegis, kaj el tiuj unu mi metis flanken, ĉar la enhavo de tiu letero datita 05-XI-2011 rilatis iun nian *diskuteton* pri poŝtmarkoj “individuaj” kaj “personigitaj”. Mi citas el ĝi:

[...] Kaprompa kaj neebila tute certe estas senmanke listigi kaj akiri tiujn pm-ojn pro manko de sciigoj, tre limigitaj eldonkvantoj ktp. Ili tamen povas esti tre interesaj prihistoriaj dokumentoj kaj mi ilin ŝatas - kvankam ilin mi ne postkuras - precipe kiam ili tute normale cirkulis tra la poŝto, de sendinto al adresito, sur formate taŭge kolekteblaj kovertoj kaj kartoj. Kio aparte gravas, ke sur ili estu iaj indikoj pri eldonkialo. [...]

via Jean

Jen klarigite, kial volonte mi informas pri tiuj *neoficialaj* pmoj, ĉar la opinio de Jean, eminenta historiisto kaj filatelisto, estas prava kaj logika, tial laŭpove mi daŭrigos kolekti ankaŭ tiujn ipm-ojn.

IPM-oj el Hispanujo

El la Madrida Esperanto-Liceo (MEL) alvenis sciigo pri du diversaj ipm-oj (=individuaj poŝtmarkoj).

2012 - Sur blanka fono la bone konata simbolo, nuance blukolora, elpensita por la 125a datreveno de Esperanto. Dum la 71a Hispana kongreso, okazinta en Almagro, estis donacita al ĉiu partoprenanto ĉi ipm. Sub la globo, blue skribita, la jena frazo: Jarojn (tiel!) faliganta limojn.



Decembre 2019 MEL eldonis diverstarifajn ipm-ojn.

A - 0,65 € - ene de Hispanujo;

B - 1,45 € - al Eŭropo (inkluzive de Gronlando);

C - 1,55 € - ekster Eŭropo.



Formato: 41 mm x 28 mm

Koloroj: blanka fono, ĉio alia verda, escepte la hispanajn vortojn, kiuj estas bluaj.

La bildo prezentas la faman 'Fontano de Cibelo'-n (*Fuente de Cibeles*) starigitan en 1782. Diino Cibelo staras fiere sur ĉaro tirata de du geleonoj, Atalanta kaj Hipomenes, pun-itaj de ŝi pro troa ilia fiereco kaj transformitaj en bestojn. Ĉi monumento estas tre amata de madridanoj. Ekzemple, dum la enlanda milito (1938-1939) kiam

la hispana ĉefurbo

estis bombata de faŝistoj, la urbanaro klopodis ĉiel ĝin protekti, precipe per sak-egoj plenaj je sablo kaj tero. Krom la fon-tano, alia grava simbolo de Madrido estas 'El oso y el madroño', nome 'La urso kaj

la arbuto': la urso surgrimpas la arbon por manĝi ties ĉi fruktojn.

Informis Ricardo BIURRUN, Madrido



ĈU ANKAŬ ĤAOSO EN LA ESPERANTA FILATELO?

Albert BOON

Kontraste al la ĝenerala supozo, la universo ne estas ordigita kosmo, sed senripoza kaoso, kiu ne sukcesas permanente ordigi procezojn, malgraŭ la ŝajne strukturataj sistemoj surbaze de la t.n. “universala leĝaro”.

Kaoso ne nur reĝas en la makrokosmo, sed ankaŭ en la mikrokosmo kiun ni nomas nian “cerbon”. Tamen, kiel la makrokosmo, nia cerbo luktas por ordigi kion ĝi rimarkas en la ĉirkaŭaĵo. Tial filatelistoj kaj aliaj kolektantoj strebas kaj penas senĉese ordigi filatelaĵojn en limigitaj rubrikoj.

Jen ekzemplo: tri specoj de “glumarkoj” kun egala temo kaj aspekto, sed kun malegalaj aplikoj. Ĉu ni ordigu ilin en iu komuna grupo (ekz. “UK-glumarkoj”) aŭ ne? Nu, vi mem decidu!

Sendube UK-glumarko de la 33^a kongreso en Malmö 1948.



Sur fono flava, brunaj siluetoj de rajda statuo kaj sonorilejo, verdaj la stelo kaj Esperanto.

Funkcioj: anoncilo, reklamilo, memor-aĵo. Formato: 51 mm x 40 mm

Okaze de la sama UK: gluetikedo (sen gluo) de skatoleteto por dentopikiloj, almenaŭ laŭ la surskribo: “SVENSKA TÄNDSTICKS AKTIEBOLAGET”.

Funkcioj: reklamilo kaj atributo por postmanĝaj problemetoj. Do ... dento-pikilujo. Sur fono ruĝeta, ĉio verda. Mezuroj: 56 x 35 mm



Kompreneble ankaŭ objekto rilate al la sama Universala Kongreso. Gluetikedo (kun gluo) por pli granda skatolo, tre verŝajne por almetujo. Do ... almetujo. La fono estas iom pli pala ol la antaŭa.

Funkcioj: pli bone videbla reklamilo, ofte kuŝanta surtable, pli ofte malfermata ol dentopikilujo (oni ja manĝas nur


tri-foje tage). Por kongresanoj sen fajrilo por ekbruligi cigaredojn, cigarojn aŭ pipon. Se ne, por kunporti bombonojn aŭ drogojn (kongresanoj estas tute normalaj homoj!). Mezuroj: 111 mm x 81 mm



Koverta
mezuro:
155 x 125 mm

Verda bildo
sur la koverta:
34 x 48 mm;
sen rando.

Oficiala stampo de la 33a UK
sur la koverta.



Rimarkoj kaj proponoj bonvenaj!



Ndr: Se la amiko Bert permesas, mi aldonas ke ekzistas ankaŭ glubebla kofro-marko, samaspekta kaj samkolora kiel la alumetujo, nur la fono estas iom pli flaveta. Ĝiaj mezuroj egalas al 112 x 820 mm.

ĈU SENKOMPATE BATALI POR LA PACO!?

Neordinara esperanta poŝtkarto frapu viajn okulojn !

Albert BOON



Averse elvolviĝas stranga evento, koŝmaro pri kruela, senindulga marbatalo. Okulfrapa estas la diferenco inter la maldekstra kaj la dekstra kartopartoj.

Maldekstre jen komplete, fierece ŝnurarmita unumasta velŝipego. Sur la meza velo granda kvinpinta stelo, sur la poba kastelo terglobo kun rubando surhavanta la vorton “ESPERANTO”. La velŝipego estas puŝata antaŭen ne nur per la vento, sed ankaŭ per ok (do verŝajne entute 16) remilegoj. Fiksita ĉe la remilo sub la prua kastelo moviĝas giganta birda flugilo triborde (do probable ankaŭ baborde). Per ŝnuretoj ligataj al la masto du birdetoj longvostaj flugante tiras la ŝipon.

La fono kun ĉielarko estas sennuba, antaŭplane la ondetoj permesas al du cignoj sekvi la ŝipon trankvile. Dume speco de lumturo sur la prua kastelo prilumas teruran scenon. La maro kirliĝas kaj ondego pereigas alian velŝipegon sub fulmotondro kaj amaso da minacantaj nuboj. Kvar strangaj kreitaĵoj (kapeto, du flugiletoj kaj kornetoj) kiel antikvaj dioj de la ventoj, blovegante kirlas diablece la detruantajn ondegojn.

Supre-dekstre, en rubando, la artisto komentas la apokalipsan scenon: “**ESPERANTO KAJ ĜIA INTERNA IDEO ĈESIGOS LA MILITOJN KIUJ TURMENTAS LA HOMARON**”.

Vere tre stranga bildkarto el tiu jaro 1920, nur du jarojn post la fino de la Granda Milito, unu el la plej teruraj masakradoj en la homa historio. Strange, tre strange, ĉar tiam la etoso en Eŭropo kaj la cetera mondo estis ege pacema, kio parte klarigas la kreskantan sukceson de Esperanto inter la du militoj. La slogano de la pacema movado estis “Ne plu milito!” kaj de tiu translima movado la nemalkomprenebla simbolo estis la rompita pafilo...



Krome, la surteksto tute kontraŭstaras la filozofion de la zamenhofa interna ideo, sur kiu la artisto sin tamen senĝene apogas.

Eĉ se ni akceptus, ke la tuta sceno estas simbola, alegoria, la malamikaj sentoj kontraŭ nenomataj malamikoj (ĉu la generaloj aŭ la germanoj aŭ aliuloj?) kaŭzas, ke tiu poŝtkarto estis kaj estas malbona, malefika fipropagando por niaj movado kaj kulturo.

Priskribo de la karto :

Mezuroj: 140 mm x 92 mm

Averse: la priskribata bildo. Enigmaj nomoj en la dekstra, suba angulo: **GALEATI OMAGGIO**.

Reverse: (*je la pĝ.16a*) surteksto **FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA** (Cartolina Postale).

Sufiĉe banala mesaĝo kun dato 28-9-20, de persono kies nomo estas nelegebla.

Ruĝa poŝtmarko: Poste Italiane / 10 centesimi. Stampo kun la vortoj **BOLOGNA ★ FERROVIA** kaj la dato: 29-IX-1920. Sendita al iu D-ro Wilhelm Hotzelt en Nurnbergo (Germanio).



Trege interesa la artikolo de Alberto BOON pri la bildkarto, eldonita - supozeble - unu aŭ du jarojn antaŭ 1920: tion ĉi mi asertas, ĉar kuŝas en mia arkivo sama karto, sendita la 6an de junio 1919. Lia komento pri la verdire sufiĉe diableca sceno renkontas mian konsenton kaj ege lin dankas pro la detala, pensiga priskribo.

Ion tamen mi ŝatas aldoni al lia komento pri la skribitaĵo, kiun li difinas banala. La teksto fakte informas nur pri baldaŭa renkontiĝo ĉe la Bolonja stacidomo de esperantisto el Bavario kun P. Modesto CAROLFI. Nefacile legeblas la subskribo, ĉar evidente lia fontoplumo elŝprucis troan inkon.

La franciskana Pastro Modesto Eŭgeno CAROLFI (1884-1958) estis tre agema kaj pasia itala E-pioniĝo. Li kontribuis al enkonduko kaj konigo de la lingvo en la katolika medio. Tre frue li lernis ĝin, antaŭ 1908. Jam en 1913 li fondis grupon en Rimini kaj poste aliajn en regiono Romanjo. Li faris plurcentojn da kursoj en Italujo, sed ankaŭ eksterlande: Anglujo, Germanujo, Bohemujo, Rusujo kaj Usono. Dum la unua mondmilito li iĝis armea pastro kaj, por savi la velkantan italan movadon, li prenis sur sin la respondecon de la Itala E-Federacio. En 1920 P. Carolfi fondis en Bolonjo la italan IKUE-sekcion, nome UECI (Unione esperantista cattolica italiana), kies prezidanto dum multegaj jaroj li estis. La 10an de novembro 1957 estis celebrita lia sacerdota or-nupto: tiam li ricevis specialan benon de papo Pio 12a kiel rekonon de sia esperanto-agado favore al tuthomara interfratiĝo.


Eldo

1998 - 83A UNIVERSALA KONGRESO MONTPELLIER

Unufoja renkontiĝo kun Jean AMOUROUX: ĉe la kongresa poŝta giĉeto, ĵus ekfunkcianta, neniuj ankoraŭ enviciĝas, nur viro tie staratendas, pacience. Sinjorino rapide alproksimiĝas, dum la deĵoranta poŝtisto prepariĝas por kontentigi la skribemulojn.

La profesia poŝtoficisto, franca esperantisto, s-ro Jean-Luc THIBIAS, ekservas la eminentan filateliston s-ron AMOUROUX: unu el liaj unuaj tri pk-oj ricevas brunkoloran stampon, dum la ceteraj nigran. Kio okazis? Laŭ lia opinio la inkkuseno estis ruĝa, poste ĝi estis pluinkumita nigre (aŭ inverse). Dua ink-kuseno tamen estas sur la labortablo, tiel ke la stampisto prefere poste ekuzas nur la nigran. Tute hazarde, ankaŭ miaj pk-oj ricevis stampojn kaj brunajn kaj nigrajn: kontentega mi estis pro tio!

En LVL-marto 1999, je la 8a paĝo, legeblas, ke Jean AMOUROUX kaj Raymond BORÉ atestis pri la ekzisto de tiu kolora variaĵo.



MONTPELLIER
Kongresejo LE CORUM
Salonego Opera Berlioz

Stampo bruna






Ambaŭ la
stampoj estas
ruĝe brunaj.

Sur alia pk kun la bruna stampo, sperte kaj lerte la poŝt oficisto surmetis ankaŭ la apudan stampon verdan. Tie ripetigās la samaj simbol-oj aperintaj kaj sur la stampo kaj sur la glm, nome akvodukto, sur kiu staras brilanta duon-suno, novklasika arkaĵaro (*Kvartalo Antigone*), riveraj ondoj kaj vinberaro, plus la E-stelo. La skribaĵoj estas kopioj de tiuj sur la glm-oj.



Kaj nun rilate al la glumarkoj: da tiuj aperis du diversaj.



Diferenco estas en la pozicio de la ondoj kaj de la skribaĵo:

(supre)


83-a Universala Kongreso
de Esperanto

(dekstre)

83-a
Universala Kongreso de Esperanto

Ŝajnas tamen, ke ekzistas ankoraŭ unu alia, kiu malhavas la vinberaron.

Bv. kompari la du bildojn kaj observi la diferencojn: Plej okul-frapas la manko de verda stelo en la suba glm. En ambaŭ, duon-suno flava. Maldekstre, kaj sube, lazuraj sulkoj simbolas la du riverojn (aŭ eble nur unu?) tra-iranta(j)n Montpelieron: *Lez* kaj *Mosson*.



LEGENDO PRI LA POŝTMARKO

Albert BOON

Antaŭ ol oni ekuzis la poŝtmarkon kiel ateston pri pagita takso, la priservon pagis ne la sendinto, sed la ricevinto. Nur se la ricevinto rifuzis pagi la takson, tiam la poŝto resendis la leteron al la sendinto kaj li devis pagi la servon.




Unuan fojon la poŝtmarko kiel atesto pri pagita takso estis efektivigita dum la maja monato de la jaro 1840 en Anglujo.

La demando, kiu unue havis ideon kaj kreis modelon de poŝtmarko, restas diskutenda. Sed estas nediskutebla fakto, ke s-ro Rowland Hill, kiel ĉefo de la angla poŝto, unue enkondukis la ekspluatadon de la poŝtmarko.

Ekzistas legendo, kiu rakontas kiamaniere naskiĝis ĉe Hill la ideo pri anticipa pago de la servo per la sendinto. Veturante foje en la provinco, Hill haltis en iu urbo por iom da ripozo kaj vidis el sia ĉareto, kiel poŝtisto transdonas leteron al knabino. Ŝi prenis la koverton, trarigardis ĝin atente kaj ĝin redonis al la poŝtisto sen ĝin malfermi, klarigante, ke ŝi, bedaŭrinde, ne havas monon por pagi la takson kaj ricevi la leteron. La poŝtisto reprenis la koverton kaj foriris. Tiam Hill, kortuŝita pro la malriĉeco de la knabino, proksimiĝis kaj donacis al ŝi ŝilingon.

La knabino dankis, sed samtempe malkaŝis la veran kaŭzon, pro kiu ŝi ne bezonis legi la leteron – la informo, kiun ŝi atendis ricevi per la letero, estis indikita per signoj sur la koverto mem. Tiel ŝi ne bezonis malfermi kaj legi la leteron, nek pagi por ĝi la takson!

Jen en tiu momento al Hill venis la ideo, ke la poŝtan takson anticipu pagu la sendinto, atestante la pagon per ia atestsigno, kia estas la poŝtmarko.



L. LEVIĈAROV, Sofia

Bazita sur korektita artikolo en: "Kolektanto", informbulteno de la klubo de esperantistoj-filatelistoj "Amika Rondo", sekcio de Bulgara Esp. Asocio - Bulgario – 1113 Sofia P. kesto 5

Jaro 8a - 1978 Numero 1 p. 6a



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX

Por: Elda DOERFLER

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidanton.

Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com;

Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be



Anoncoj

Kiu el vi scias ion pri ĉi ukraina ipm-o?

Kiu ĝin eldonis?

Ĝi aperis en

2017: je kiu

preciza dato?

Kiom da ipm-oj

estis eldonitaj?

Kia estas ĝia

nominala valoro?

Ĉu ĝi estas aĉetebla?

Koran dankon al kiu

estos tiel ĝentila min informi!



Mi havas ankoraŭ je dispono 12 pol-
ajn tutaĵojn 2017 (vidu suben). Unu
kostas nur 1,50 eŭrojn + afrankon.
Se oni ne urĝas, ĝin oni povas ricevi
kune kun la venonta, aŭgusta, LVL,
do ne pagendos la sendokosto.
La interesiĝantoj bonvolu kontakti
la prezidanton.

